



Aprilo-Majo-Junio 1956a, Nroj 8-9-10

# LA JUNA VIVO

MONATA GAZETO DE „TUTMONDA ESPERANTO-JUNULAR-ORGANIZO“

*Redaktejo: S-ino E. Burgler, Spaubeek (L), stacidomo*

*Administrejo: F-ino C. van Spengen, Hilversum, Loosdrechtseweg 55*

*Ĝiro de TEJO por Nederlando: 537168 Abonprezo 3.50 ned. guld. aŭ egalvaloro*

## Karaj amikoj!

De kelkaj jaroj kun granda ĝojo mi ricevis en iuj temp-periodoj vian „La Juna Vivo“-n. Grandajn dankegojn!

Mi ne scias, ĉu vi legadas bultenon de la Esperantista Asocio en Pollando, kaj tial mi volas sciigi vin pri grandaj sukcesoj de la Esperanto-movado en mia lando laste.

### Unue:

1. decido de la Plenum-komitato de Mickiewicz-Jaro eldoni en Esperanto „Sinjoron Tadeon“ kaj monografion pri Mickiewicz de Jastrun.
2. aranĝo de sukcesplena renkontiĝo de junaj esperantistoj dum la V-a mondfestivalo de la Junularo kaj Studentoj en Varsovio.
3. Refondo de la Filio de Asocio en Krakovo kaj fondo de novaj filioj en Stalinogrod kaj Lodz.
4. Oficiala permeso aliĝi al U.E.A.
5. Sukcesplenaj kursoj en Varsovio, Vroclavo, Stalinogrod, Gdansk, Cieszyn kaj Krakovo.
6. Restarigo de Esperanto-lektorato ĉe la Krakova-universitato.
7. Akiro de nova pli ampleksa kaj bela ejo por sidejo de la Ĉefa Estraro de Asocio.

8. Favoraj opinioj en la pola gazetaro pri Esperanto.

9. Dono de la pasportoj al la partoprenantoj de Universalo Kongreso en Bolonjo.

**Due:** belege eldonita ilustrita pola epopeo „Sinjoro Tadeo“ de Mickiewicz kaj monografio pri Mickiewicz de Jastrun - jam estis eldonitaj. En la 1956-a jaro estas eldonita bela romano „Faraono“ de Prus, en traduko de Tuvim.

**Tri:** en somero 1955 en Vroclavo estis Enkonduka Konferenco de Junaj Esperantistoj el vroclava kaj stalino-grada regionoj. En fino de la Konferenco, post vigla disputo oni akceptis la rezolucion, kiu - rekomendas organizi junularajn sekciojn ĉe la Filioj de Asocio de Esperantistoj kaj deklaras por organizita kunlaboro inter ĉiuj tiaj sekcioj en Pollando.

**Kvare:** - malsupre mi citas leteron de la varsoviaj studentoj-junaj esperantistoj:

Karaj Gekolegoj el Tuta Mondo! - Kun granda ĝojo ni tralegis en lasta numero de nia „Bulteno“ alvokon al junaj esperantistoj por ke ili disvastigu Esperanton inter gejunuloj kaj

# NIA KONGRESO EN BÜSUM

de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 1956a.

Tiuj el ni, kiuj jam iam organizis junularkunvenon, bonege scias, kiom da laboro kaj energio kostas ĉi afero. Kvankam ni ne regule alportas detalaĵn informojn, ne pensu, ke OKK dormas. Ho, tute ne! Diligentege ĝi laboras, por inde akcepti vin ĉiujn kaj por kontentigi eĉ la plej famajn „grumbulojn”. Ne forgesu do anonci vin kiel eble plej baldaŭ. Pagu samtempe la deziritan sumon (fiksita je

20.- gm.) al S-ino Heinke Sommer, Büsum, Poŝtĉekkonto: Hamburgo No 19 93 44 per ĝiro.

Bonvolu aldoni al via aliĝilo internacian respondkuponon kaj afranku nepre filatele por la ekspozicio.

Informojn donas: Sro Claus Ohlen, prezidanto de OKK, Hamburgo I. Rosenallee 9 III.

En nia sekvonta numero ni esperas doni al vi pli detalaĵn informojn.

---

pliprofundigu amikecon inter junularo de la tuta mondo.

Respondante al tiu alvoko, mi volas komenci kolektivan amikan korespondadon per Esperanto kun studentoj aŭ studentaj grupoj de ĉiuj landoj. Ni estas gestudentoj de tria jaro de Komunika Fako de pola teknika Altlernejo (Varsovia Politekniko). Nia grupo konsistas el pli ol 20 gejunuloj, sed nur kelkaj el ni estas esperantistoj. Por pli interesigi ceterajn miajn gekolegojn mi volus korespondi kolektive. Nin tre interesas studenta vivo, studado, Junularo movado, sporto kaj aliaj studentaj aferoj. Ankaŭ mi volas daŭrigi ideojn de frateco kaj amikeco inter diversnaciaj gejunularo-regantoj dum V-a Junulara Festivalo en Varsovio.

Ni petas ĉiujn studentojn-esperantistojn bonvolu akcepti mian proponon. Ni esperas viajn leterojn! Ankaŭ ni alvokas polajn gekolegojn: disvastigu Esperanton en Viaj medioj kaj sekvu nin, por montri vivecon kaj utilcon de Esperanto en ĉiuj vivrilatoj.

Nome de I-a grupo de studentoj de III-a jaro de Komunika Fako de Varsovia Politekniko.

S. Michalski.

Leterojn skribu:

S. Michalski - Warszawa 17  
str. Akademicka 5/ pokoj 826  
lando.

Ĉiuj sukcesoj plenigas min per espero - ke Esperanto Movado en mia lando atingos ankoraŭ pli grandajn venkojn.

Mi estas tre dankema al vi por sendita gazeto. Eble en plej proksima estonteco mi povos reguligi miajn abon-kotizojn. Dume mi interkomunikigos kun Asocio pri eblecoj de sendado de la noveldonita „Sinjoro Tadeo” eksterlanden.

Nuntempe mi loĝas en Zotoryja - se tamen vi povos sendi plu vian gazeton, sendu ĝin al malnova adreso:

Tarnow Moniuszko-str. 8, woj. Krakowskie.

Korajn salutojn kaj bondezirojn sendas al la tuta Redakcio kaj Administracio de „La Juna Vivo” pola amiko Leszek Dobrowolski Zotoryja Henryka Poboznego 40 / m 2 woj. Wrocawskie.

## ORGANIZAJ INFORMOJ:

**Svedujo:** Nia diligenta amiko S. Kas-sai, Sundbyberg, tute resaniĝis, kaj ree diligente laboras por fondi firman bazon por nia movado en sia nova hejmo. Ni baldaŭ esperas ricevi de li pli detalajn informojn dezirante sukceson por lia laboro.

**Anglujo:** De F-ino N. Rees ni ricevis la novajn kotizojn, tiel ke al ni sukcesas eldonigi pli novan numeron de La Juna Vivo. Koran dankon.

**Francujo:** Ankaŭ al Sino L. Giloteaux ni kore dankas ŝian laboremon. Jam la duan fojon ŝi sendis al ni la kolektitajn kotizojn. Jen homoj, kiuj laboras por la estonteco de nia junularmovado. Se ni havus almenaŭ 25 laborantajn gejunulojn, nia organizo fariĝus unu el la plej gravaj kaj plej fortaj movadoj sur la mondo.

**Roubaix:** Sro L. Giloteaux kun sukceso gvidas esperanto-kurson por la junularo.

**Nancy:** La TEJO-sekcio malgraŭ di-

versaj malfacilaĵoj vivas. Kunvenoj regule okazas en la Junuldomo, 36, cours Leopold, la 1an, 3an kaj eventuale 5an jaŭdojn de ĉiu monato. La 2an kaj 4an jaŭdojn okazas komunaj kunvenoj kun la UEF-grupo en la strato de Mon-Désert No 31.

**Germanujo:** La nova germana peranto amiko Krüger penas akiri klaran superrigardon pri la situacio. En nia sekvonta numero ni esperas legi lian raporton kaj ankaŭ raporton pri la interzona renkontiĝo en Berlino. Hubert, bonvolu sendi kiel eble plej baldaŭ detalan artikolon pri ĉio.

**Hispanujo:** La situacio por TEJO ŝajnas pli konvena, bedaŭrinde la neregula aperado de LJV iom malhelpas la progreson. Ni deziras al niaj diligentaj laborantoj tie forton kaj prosperon.

**Portugalujo:** Laŭ la ŝajno ankaŭ ĉi tie ni sukcesos formi ian bazon por nia movado.

---

### Internacia konferenco de Esperantistaj Studentoj en Lyon, Francujo, de 21a ĝis la 24a de julio 1956a.

#### INFORMOJ.

1. Por partopreni la konferencon necesas sendi ateston de la fakultato (altlernejo) kaj sian adreson al: Studenta Esperanto-Grupo „Jules Verne”, 7 rue Major Martin, LYON, sed ke tio atingu la grupon antaŭ la 1-a de julio. Krome necesas sendi 300 fr.fr. al ĉekkonto No 2444-99 Lyon, SOCIETE ESPERANTISTE de LYON, 31, rue de la Bourse. Studentoj, kiuj tute ne povas sendi Monon ĉekkonte, povas pagi la sumon al ĉef - delegito
- aŭ peranto de U.E.A.
2. La grupo „J. Verne” rezervas tranoktejojn (100-150 fr.fr. ponokte) kaj nutradon (85 fr.fr. tagmeze kaj 85 vespere). Antaŭpago ne necesas.
3. Interesatoj pri la literatura prelego, la prezentoj de grupoj kaj la filmprezento anoncu sin kiel eble plej frue. Se eble, kunportu nacian kostumon.
4. Je la alveno adresu vin al la konferenco.  
Bonvenon!

S.E.G. „J. Verne”.

## MALNOVA ANGLA KUTIMO.

### Yew tree well.




Foto: S. Jamieson, Manchester

Dum mia somera libertempo mi hazarde vidis malnovan kaj belan kutimon en la graflando Derbyshire. Ĝi estas tio de „well-dressing”, la dekorado de putoj. Al mi, kiu ĉiam loĝis en la mezokcidenta parto de Anglujo, ĝi estis nova kaj vere belega spektaklo, kaj mi eltrovis la sekvantan informon pri ĝi.

Ĝi estas malnova kutimo, kiu ree populariĝis dum la lastaj jaroj. Vilaĝo post vilaĝo rekomencis aŭ komencis la tre ĉarman kutimon, kaj starigis ĝin kiel ĉiujaran feston. Miloj da vizitantoj venas por vidi la laboron de la florartistoj en la diversaj vilaĝoj.

Granda bildo, plejofte vidaĵo el Biblia historio, estas kreita el floraj petaloj, muskoj, likenoj, filikoj, kaj aliaj naturaj dekoracioj, metitaj en fonon faritan el mola argilo. Ĉi tiuj bildoj estas starigitaj super putoj aŭ fontoj. La rezulto estas belege kolora, kaj memorigas la rigardanton pri tapiŝo, brodita per floroj. Tiuj, kiujn mi vidis, estis la bildoj de „La Semisto”, kaj la „Perdita Peco de Arĝento”, detale perfektaj kaj belegaj.

La celo estas esprimi dankon pro pura akvo, kaj kelkaj verkistoj diras, ke ĝi venas de la Romana festo „Floralio”, aŭ la Druidoj kiuj disjetis florojn en riveretojn por danki paganajn diojn. Kelkaj aŭtoritatoj opinias, ke la ideo estas alprenita de la fruaj Kristanoj, kaj la kutimo restas en distriktoj malproksime de la multokupataj regionoj.

Tamen, estas ĝenerale akceptite ke la kutimo komenciĝis en la „Derbyshire” vilaĝo Tissington. Tie estas la putoj montrataj en niaj ilustraĵoj, kie la dekoracia elmontro okazas ĉiujare je la Tago de la Supreniro-en 1956, la 10an de Majo.

La kutimo estas restarigita en Eyam, kie mi vidis „La Semisto” kaj „La Perdita Peco de Arĝento”, dum la Festo de Britujo. De tiu tempo oni regule faras ĝin je la sabato antaŭ la lasta dimanĉo en Aŭgusto (Wakes Eve), kaj estis bonŝance ke mi pasis tiun lokon ĝustatempe.

**Represita kun permeso el „The British Esperantist”.**

## Rakonto dediĉita al Irene kaj Bobi Baur en Bern, Svislando.

Sen ia dubo Paĉjo Flimzitimzi komencis esti forgesema. La tuta familio sciis tion - Panjo, Toĉjo lia dek-jara filo kaj eĉ Linjo la ses-jara filineto.

Ja Paĉjo mem rimarkis la fakton kaj, ĉar li estis saĝa homo - komprenoble magiisto estas saĝa homo - li decidis ion fari senprokraste.

Venu Toĉjo! - li diris - de nun vi devas akompani min al mia laborĉambro kaj lerni mian arton, ĉar necesas, ke iu el ni havu bonan memorokapablon. Iujn sorĉojn oni povas skribi en librojn, sed estus danĝere skribi ĉiujn.

Do Paĉjo kaj Toĉjo iris al la laborĉambro kaj tie, inter la multkoloraj kaj strangaformaj boteloj Toĉjo ricevis sian unuan lecionon.

... \* ...

Nu - diris la patro - senfinan laboron provizas al mi la kunikloj. Vi rimarkis, sendube, ke ili havas blankajn vostojn! Nu, ĉar mi havas sufiĉe altan rangon inter la magiistoj mi havas la titolon „Ĉefblankigisto de Kuniklaj Vostoj”, kaj mi devas prepari la sorĉlikvaĵon per kiu oni blankigas la vostojn de la junaj kunikloj.

Jen, do, rigardu! Notu la proporciojn kaj la ordon de enverŝo, kaj super ĉio memoru la sorĉkanton!

Al du gramoj da blanka faruno aldonu tri gramojn da kreto. Miksu bone kaj tiam enverŝu kvaronlitron da blankaj rozpetaloj. Pistu ĉion ĝis la miksaĵo aspektas kiel blanka pulvoro. Malrapide enmiksu duonlitron da freŝa lakto, kaj boligu dum kvaronhoro.

Tiel parolante li preparis la miksaĵon, metis la poton sur la fajron kaj zorge kirlis la likvaĵon per arĝenta kulero.

Kaj nun la grava momento! - li di-

ris. Enmetu pinĉon da tartratkremo kaj kantu kun mi .....

**Jen kuniklo via vosto**

**Blanka kiel seka ostoj!**

**Abrakadabra, estu tiel,**

**Nigra estu ĝi neniel!**

Kune ili tion faris, kaj kiam la likvaĵo iom malvarmiĝis Paĉjo prenis kelkajn gutojn per kulero.

Provu ĝin kun mi - li diris - kaj memoru la guston!

Ili gustumis, kaj Toĉjo notis la iom maldolĉan efikon je la lango.

Sed post momento li viŝis la okulojn per la maniko kaj grandokule fiksigardis al la patro.

Paĉjo! - li diris - Mi povas vidi tra via stomako ..... kaj nun via brusto malaperas!

Ho ve! - respondis Paĉjo - Kaj ankaŭ vi plejparte ne estas videbla! Kion mi faris? Mi sendube forgesis en meti ion, aŭ fuŝis la ordon. Baldaŭ ni estos nevideblaj, kaj estas tiom longe de kiam mi ekzercis min pri la nevidebleco, ke mi forgesis la necesajn receptojn kaj sorĉojn. Ho ve! Ho ve!

Dum kelkaj momentoj Toĉjo timis kaj tremis, sed tiam Paĉjo diris - Ne timu, Toĉjo kara! La afero iomete ĝenos nin, sed ni havas bonajn amikojn. Mi devos viziti mian afrikan amikon, Muŝ Araf Arabi, en Timbuktu, kaj peti lian helpon. Li estas mondkonata magiisto, tre ĝentila kaj helpema, kaj li facile solvos nian problemon.

Ĉu vi permesos al mi akompani vin, Paĉjo?

Kial ne? Evidente vi ne povas viziti la lernejon en tia stato. Sed unue ni devas klarigi al Panjo.

... \* ...

Panjo ja saltis en la aeron kiam ŝi aŭdis voĉon, sed vidis neniun. Tamen, dum longaj jaroj ŝi kutimiĝis al la stranga konduto de Paĉjo, do ŝi aŭskultis al la klarigo, riproĉis Paĉjon pro lia forgesemo kaj petis, ke ili plej-eble rapide plenumu la aferon.

Estas bone - ŝi diris ke Toĉjo akompanu vin, ĉar estas dezirinde, ke li vidu la mondon iomete. Sed zorgu pri li kaj revenigu lin sendifekte, alie vi devos respondi al mi, mi promesas!-

Kaj sekrete ŝi flustris al Toĉjo - Zorgu pri via Paĉjo! Li estas tiom forgesema, ke mi timas, ke iun tagon li forgesos eĉ la propran kapon. Kaj senkapan edzon mi vere ne povus toleri!

... \* ...

Nu, estas tre facile paroli pri vojaĝo al Afriko, sed estas tute alia afero tion entrepreni - precipe kiam oni estas nevidebla!

Vidu, Toĉjo - diris Paĉjo - Ni devas pripensi la aferon kaj fari taŭgajn aranĝojn. Unue, pri la vestoj! Ĉio, kion ni portis kiam ni gustumis la sorĉlikvaĵon nun estas nevidebla. Ni ne deziras surmeti pluan kompletan, precipe ĉar ni iros al varmega lando, kaj eĉ se ni tion farus, ni prezentus timigan aspekton al la personoj, kiujn ni renkontus, ĉar ili vidus niajn vestojn, sed ne niajn vizaĝojn kaj manojn. Tio provizus teruran ŝokon, precipe al la sinjorinoj ..... kaj ni tute ne deziras esti malĝentilaj!

Plua afero! Se ĉe la fervoja stacio aŭ sur la ŝipo ni petus bileton, la kompatinda komizo sendube imagus, ke li komencas frenezigi.

Ne! Necesas, ke ni restu tute nevideblaj kaj ne parolu en la ĉeesto de aliaj personoj. Sed por trovi kaj rekonu unu la alian ni devas porti ion videblan, sed tre malgrandan, kaj voku unu la alian per speciala signalo.

Mi iam instruis al vi kiel imiti la vokon de la kukolo. Ĉu vi ankoraŭ kapblas?

Jes, Paĉjo! - respondis Toĉjo - Jen, aŭskultu! Kaj blovante tra la kunmetitaj manoj li perfekte signalis „**Kuku! Kuku!**”

Bone! - diris Paĉjo; kaj tiam li turnis sin al skribotablo.

Jen kelkaj poŝtmarkoj! Gluu unu sur vian frunton, kaj mi samon faros. Tiam ni almenaŭ scios, kie ni estas!

Ĉar ili devis nenion paki kaj porti la preparoj por la vojaĝo estis jam faritaj, do ili adiaŭis al Panjo kaj Linjo kaj promenis rekte al la stacidomo.

La kuna promenado estis iom stranga kaj eĉ malfacila, ĉar la paŝoj de la patro estis pli longaj ol tiuj de Toĉjo; sed per mallaŭtaj flustroj kaj fojaj tusoj kaj tuŝoj ili sukcesis atingi la stacidomon sen akcidento kaj sen ia rimarko flanke de la preterpasantoj.

Feliĉe je tiu tago nemultaj personoj veturis al la marbordo, do ili sukcesis trovi neokupitan kupeon en la vagonaro, kaj sen ia ĝeno ili atingis la dokon kaj iris sur la ŝipon.

La ŝipo estis grandega kaj luksa, kaj per lerta kaj zorga manovrado ili spertis ja ĝojplenan vojaĝon. Kompreneble ili devis manĝi kaj dormi, sed neniu rimarkis la malaperon de iuj manĝaĵoj postlasitaj en la granda manĝsalono, nek, dum la nokto, la ronkojn en iu ŝajne neokupita kajuto.

Estas vere, ke dum la vojaĝo iu maljuna sinjorino asertis, ke ŝi aŭdis la krimon de kukolo; sed ĉiu scias, ke kukolo ne nestas sur ŝipo, do oni afable aŭskultis ŝian aserton, ĝentile esprimis surprizon, kaj sugestis al ŝi, ke ŝi skribu leteron al la redaktoro de la ŝipgazeto.

Ankaŭ iu riĉa sinjoro, kiu trinkis multe da vino dum la ĉefmanĝo kaj restis iom longe en la manĝsalono,

juris, ke li vidis poŝtmarkon rekte antaŭ siaj okuloj, kaj tuj poste pomo flugis el fruktujo sur la tablo kaj malaperis. Tamen oni scias, ke duon-ebria homo kapablas imagi ĉiuspecajn aferojn!

.. \* ..

Paĉjo kaj Toĉjo senakcidente atingis Afrikon, kaj post tre malkomforta flugado trans la dezerto (ĉar la aeroplano estis plenplena, kaj ili devis sidi sur la kestoj en la malgranda pakajejo) ili fine alteriĝis apud Timbuktu.

Nu, mia filo - diris Paĉjo - jen ni alvenis!

Jes, Paĉjo! Sed vi ne kapablas paroli la araban lingvon, kaj eĉ se jes, via senkorpa voĉo nur timigus la Arabojn. Kiel ni povas trovi vian amikon?

Ne necesas, mia kara! Ni aranĝos, ke li trovi nin! Rigardu! Jen estas sinjorino kiu pendigas ĵuslavitajn tukojn, por ke ili sekiĝu. Ni simple deprenas la fiksilojn ..... kaj jen la tukoĵ falas!

Fakte la tukoĵ falis, kaj la sinjorino rigardis ilin kun konsterno.

Je la tombo de mia prapatrino! - ŝi diris - Ili estas ensorĉitaj! Mi devas tuj venigi Muŝ Araf Arabi, por ke li rompu la sorĉon!

Tuj ŝi forrapidis, kaj post kvin minutoj revenis kun dignoplena, longbarba araba sinjoro. Tiu staris antaŭ la tukoĵ, faris en la aero kelkajn strangajn svingojn per la indikofingro de la dekstra mano, kaj poste silente meditis.

Paĉjo kaptis la okazon, silente alpaŝis kaj flustris en lian orelon.

Abrakadabra! Amiko Muŝ Araf Arabi! Mi estas Flimzitimzi, magiisto el trans la maro, kaj Ĉefblankigisto de Kuniklaj Vostoj. Mi deziras paroli private kun vi, kaj ĉar mi ne scias vian precizan adreson mi faligis la tukoĵn, por ke la sinjorino alkonduku vin.

Bone! - diris Muŝ Araf Arabi laŭvoĉe. - Mi sukcesis rompi la sorĉon, sinjorino. Rependigu la tukoĵn, kaj ili bone sekiĝos.

Dankon, ho saĝulo! - ĝentile respondis la sinjorino.

Muŝ Araf Arabi tuj iris hejmen kaj Paĉjo kaj Toĉjo akompanis lin. Survoje Paĉjo klarigis la kialon de la vizito kaj prezentis Toĉjon al la araba magiisto.

Sendube - diris Muŝ Araf Arabi - ni sufiĉe facile solvos vian problemon, sed por eviti ian eraron mi devos traserĉi miajn librojn kaj trovi la precizan sorĉon. Intertempe vi estas miaj honorataj gastoj kaj mi plej kore bonvenigas vin en mian domon.

La triopo eniris la belan domon, kaj la Arabo klarigis ĉion al sia edzino, kiu tuj pretigis kafon kaj petis ilin akcepti fruktojn.

Intertempe Muŝ Araf Arabi trafolumis siajn librojn kaj fine trovis la bezonatan sorĉon.

Nu - li diris - por prepari la necesan sorĉlikvaĵon vi bezonos foliojn de ses diversaj arboj, kaj ŝajne por ilin trovi vi devos viziti diversajn landojn.

Nu, legu la recepton! - petis Paĉjo.

Bone! - respondis Muŝ Araf Arabi - jen ĝi! Kolektu unu folion de kverko, du foliojn de ulno, tri de nukсарbo, kvar de ilekso, kvin de kaŝtano kaj ses de lonicero. Trempu ilin en pura akvo en granda poto kaj lasu stari dum kvar tagoj sub ombro de saliko. Je la kvina mateno faru per via sorĉbastono cirklon sur la tero, larĝa proksimume du metrojn. Aspergu la tutan areon de la cirklo per la likvaĵo. Tiam staru meze en la cirklo, rigardu la levigantan sunon kaj krii trifoje.

**Abrakadabra! Ne fantomo**

**Estu mi, sed vera homo!**

Sufiĉe simpla - diris Paĉjo - sed kutime mi fuŝas la ordon kaj forĝe-

sas la sorĉkrión; kaj tion mi nepre faros dum la longa serĉado por la diversaj folioj.

Sed eble vi povos eviti tion - res-pondis Muŝ Araf Arabi - Unue, vi povos trovi ĉiujn arbojn kune en la Nacia Parko de Danlando. Due, Toĉjo povos memori la sorĉkrión, ĉu ne Toĉjo?

Jes, sinjoro! - diris Toĉjo.

Sed pri la ordo de enmikso de la folioj! - malespere petis Paĉjo.

Nu, vi estas Ĉefblankigisto de Kuni-klaj Vostoj, ĉu ne?

Jes, sed .....

Bone! Memoru, mi petas, la vorton KUNIKLO.

Jes ..... sed kial?

Ĉar jen vi havas la ordon! Kverko, Ulno, Nuksarbo, Ilekso, Kaŝtano kaj Lonicero!

Kaj la fina 0?

Tiu reprezentas la magian cirkon!

Ho, mirinde bone! Eĉ mi povos tion memori!

... \* ...

Do post du-tri tagoj de ripozo sub la arde brilaj sunradioj Paĉjo kaj Toĉjo dankis kaj adiaŭis Muŝ Araf Arabi kaj lian familion kaj ekveturis al Danlando.

Tie ili baldaŭ trovis la Nacian Parkon, kaj post diligenta serĉado trovis la bezonatajn foliojn. Ĝojplene ili preparis la miksaĵon kaj ĝin metis en grandan poton. Kvar tagojn ĝi staris en la ombro de saliko, kaj la kvinan matenon ili markis la magian cirkon kaj aspergis ĝin per la likvaĵo. Unu post la alia ili staris en la mezo, rigardis al la leviĝanta suno, kaj trifoje kriis -

**Abrakadabra! Ne fantomo**

**Estu mi, sed vera homo!**

Sukcesplene ili plenumis la aferon,

kaj kun granda ĝojo kaj ekscito Toĉjo vidis unue la ŝuojn, poste la kruojn kaj fine la torson, brakojn kaj kapon de la amata Paĉjo. Preskaŭ tuj poste ankaŭ Toĉjo videbliĝis, kaj la du faris frenezan fandangon ĉirkaŭ la cirklo.

Ĉar restis iom da likvaĵo en la potoj ili fosis profundan truon, enmetis la poton, kovris ĝin per granda lignopeco kaj fine replenigis la truon per tero.

Nun ili bezonis monon - Danan monon - por la veturado ..... kaj ili ne posedis. Ili tial piediris al Kopenhago kaj elserĉis Knud Knudson, la ĉefdelegiton de la Internacia Instituto de Modernaj Magiistoj. De li ili prunteprenis sufiĉan monon por pagi la vojaĝkoston ĝis la hejmo.

Post du tagoj ili trairis la pordon de la propra hejmo, kaj Panjo kaj Linjo ĝojplene ĉirkaŭbrakis kaj salutis ilin.

La postan tagon Toĉjo reiris al la lernejo, kaj je la unua periodo la leciono temis pri geografio.

Ni daŭrigos nian studadon pri Afriko - diris la instruisto - pri la lando de kameloj, dezertoj kaj daktilarboj. Bedaŭrinde Toĉjo Flimzitimzi forestis dum kelkaj tagoj, do li scias nenion pri tio.

Toĉjo diris nenion, sed sekrete li ridetis al si. Li ankoraŭ povis vidi, en la menso, bildon de la araba sinjorino, kiam la ĵslavitaj tukoj falis al la tero!

... \* ...

Se iam vi, kara leganto, konstatas, ke vi akcidente nevidebliĝis, vi scias kie troviĝas provizo de la sorĉlikvaĵo. La truo estas sub la tria saliko en la Nacia Parko, maldekstraflanke survoje al Kopenhago.

Ne forgesu!

W. A. Gething.



## "JULIUS CAESAR" EN BRISTOLO!

Lundomatene kiam mi promenis en Kastelostrato, mi vidis fantomon alproksimiĝanta al mi. Li estis vere malnova viro el malnova mondo. Kiam li estis apud mi, li diris:

„Mi scias mian nomon; mi estas Julius Cezaro. Mi ankaŭ scias de kie mi venis; mi estas el la Spirita lando - sed mi tute ne scias kie mi estas.”  
„Ĉu ĉi tiu urbo estas „Pompeii”, la perdita urbo?” li demandis. „Ĉu nuntempe estas la unua jarcento?”

„Ne”, mi respondis, „ĉi tiu urbo ne estas „Pompeii”, ĝi estas Bristolo. Vi ne estas en Italujo, vi estas en Anglujo. Ne estas la unua jarcento, estas ja la dudeka jarcento.”

„Anglujo! Anglujo!” li kriis, „miaj militistoj konkeris Anglujon!” „En tiu tempo mi estis militisto. Nun, mi estas Paca spirito. En tiu tempo nur potencon ŝatis mi, sed nun mi scias, ke la humilaj homoj heredos la teron. Mi lernis la pli bonan vojon en la Spirita lando.” „Estas pli bone lerni pri tiu vojo antaŭ la morto ol post la morto.”

La spirito de Julius Cezaro tiam rigardis ĉirkaŭ si, kaj vidante la rui-

nojn, li demandis - „Kie estas la butikoj kaj la domoj?” „Kial la urbo estas en ruinoj?”

Mi respondis, „la tuta mondo militas, kaj milito ruinigas la belajn urbojn kaj la urbetojn de nia lando. Estas terura afero!”

Cezaro gratis sian kapon kaj diris: „Mi ne komprenas. Estas tute konfuzige. Mi kredis, ke Kristanaj misiistoj foriris el Italujo kaj alvenis Anglujon por instrui la vortojn de Jesuo Kristo, kaj ties novan vojon de la Vivo, kaj por prediki pri amo, bonvolo, frateco kaj paco. Mi kredis, ke dum tiu jaro estis la komenco de la finiĝo de militado.”

La vento blovis kaj Cezaro foriris kun la vento, sed mi pensis kaj miris. Ĉu la homoj en la mondo lernos iam la vojon de Jesuo. Mi tiam promenis al mia laboro, kantante al mi la vortojn de la himno.

„Gento kun gento, kaj lando kun  
(lando

Vivos kunule sen ia ribel'  
Ĉiu kun ĉiuj vivados gefrate -  
Filoj liberaj de sama Ĉiel'.”

Randolph Tovey.  
(verkita dum la militjaroj)

---

### Esperantista kroniko.

Nia ano Sro Michel Duc Goninaz kaj f-ino Arlette Lecourtois geedziĝis la 24an de marto 1956a. Ni deziras al la juna paro grandan feliĉon.

Gesroj Koopmans, „Malgranda Paradizo” Hilversum, sciigas nin pri la naskiĝo de filineto. Ni kore gratulas ilin kaj deziras, ke ili havu multe da plezuro ankaŭ pro ĉi infano.

Sro Vágó Imre, instruisto, Pécs, Rudas László u. 21 deziras konvinki siajn superulojn pri la neceso de Esperanto kaj organizas tiucele ekspozicion de infandesignaĵoj \*) dum la monatoj julio-aŭgusto 1956a. Bonvolu helpi lin grandskale kaj sendu kiel eble plej grandan kvanton.

\*) (de infanoj 6-14 jaraĵ).

## „VELU NI”. LUDKANTO.

(Kantludo por Festoj)

Esperantigis Gordon Watson.

### Formacio:

Paroj faras duoblan rondon (kna-  
boj interne, se estas pli da knaboj ol  
knabinoj: kaj inverse). Ili krucligas  
la manojn, kvazaŭ ili glitkuras. En la  
mezo de la rondo staras la senkun-  
ulinaj knaboj.

### Ludmaniero:

La paroj rondpromenas malrapide-  
me en baldanca direkto, kaj kantas  
laŭ lule-svinganta ritmo. (Ili estu  
malrigidaj, svingante la korpon facile  
de la koksoj). Kun la vortoj „veturas  
sur la maro” ĉiu turnas sin for de la

kunul(in)o, dors-al-dorse, sed daŭre  
tenas ties manojn. Por fari tion estas  
necese levi la brakojn.

La paroj tiam disiĝas. La knabinoj  
daŭre promenas ronde en la originala  
direkto, la knaboj rondiras en la kon-  
traŭa direkto. Dume, la unuopuloj en  
la mezo venas en la knaban rondon.  
Ĉe la vorto „Kia”, ĉiu knabo tenas la  
manojn de la plej proksima knabino.  
Se li maltrafas, li iras en la mezon.  
La novaj paroj rondpromenas nove  
kontraŭhorloĝe kaj oni ripetas la  
kantludon laŭvole.

## MUZIKO LAŬ LA TONIK-SOLFA SISTEMO.

Gamo G.

$\frac{2}{4}$	d : d . d	$l_1 : s_1$	d : d . d	$l_1 : s_1$				
	MI IR - IS	NORD - EN,	MI IR - IS	SUD - EN,				
	d : d	d : d	m : s . s	m : d				
	NORD - EN,	SUD - EN,	PER VAG - ON -	AR - O,				
	s : m . m	s : m	d : d . d	$l_1 : s_1$				
	HE - DI - DI	VA - RO!	PER VAG - ON -	AR - O,				
	d : d . d	m : s . s	m . m : r . r	d : d.				
	MI PLI VOL	- ON - TE VET -	UR - AS SUR LA	MAR - O,				
	m : s	s : -	$l_1 : s$	s : m	m : -	r : -		
	VEL - U	NI,	VEL - U	SUR LA	MAR -	O.		
	d : d	$l_1 : s$	d : d	$l_1 : s$	d : m	s : m	r : -	d : -
	NOV - AN	IN - ON	TROV - U	NUN,	KI - A	BEL - A	PAR -	O.!

Gordon Watson (Greenford, Anglujo).



*Listo de radio-dissendoj en aŭ pri Esperanto de diverslandaj stacioj. Kompilis ĝin 25/V/1956 S. S. de Jong, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, TJERIKWERD bij BOLSWARD (Frislando), Nederlando.*

*Mallongigoj: I = informoj; K = kurso; P = parolad(et)o aŭ prelego; m = ondlongo en metroj; kc = frekvenco en kilocikloj en sekundo; M = muziko. Tempindiko: M.E.T. (=Mez-Eŭropa Tempo).*

## Verdlando Vokas.

### DIMANĈE:

- 15.00—15.15 Piraçununga (Brazilo), 198 m (1520 kc): K.  
 24.00—00.30 Bilbao (Hispanujo), 265 m (1131 kc): P.

### LUNDE:

- 13.30—14.00 La Coruña, 250 m (1200 kc): P kaj I.  
 23.35—23.57 Hilversum I, 402 m, (746 kc), NCRV: P pri: „La Evangelio en Esperanto”. Muzika enkadriĝo de Jelly Koopmans-Schotanus, sopranino, kaj Meindert Boekel, orgena akompano. (Nur la unuan lundon de ĉiu monato).

### MARDE:

- 01.45—02.00 San José (Uruguay), 192 m (4562,5 kc): P.  
 12.55—13.00 Bern, 31,45 m (9535 kc), 48,66 m (6165 kc): P de d-ro Arthur Baur.  
 16.00—16.10 Ljubljana (Jugoslavujo), 327,1 m (914 kc), 221,4 m (1355 kc), 3,19 m (94100 kc), 3,23 m (92900 kc), 3,42 m (87700 kc): I.  
 18.35—18.40 Bern, la samaj ondlongo, frekvenco kaj P kiel 12.55.  
 20.00—20.15 Stockholm, 19,9 m (15050 kc), 26,1 m (11513 kc), IBRA (Libera Sveda Kristana Radio per la sendilo Tanger): P kaj I. (Nur la lastan mardon de ĉiu monato).  
 20.15—20.30 Carlet (Hispanujo), 288 m (1040 kc): I.

### MERKREDE:

- 16.30—16.40 Wien II, 25 m (12000 kc), 30 m (10000 kc), 41 m (7512 kc), 48 m (6250 kc), 203 m (1474 kc): P.  
 17.00—17.10 Caramulo (Portugalo), 205 m (1463 kc): I.  
 18.55—19.10 Rome, 25,4 m, (11810 kc), 30,9 m (9710 kc), 41,24 m (7270 kc): P de Luigi Minnaja.  
 22.55—23.05 Wien II, 25 m (12000 kc), 48 m (6250 kc), 208,4 m (1440 kc): I.  
 23.50—24.00 Hilversum II, 298 m (1004 kc) (en la 3-a kvaronjaro de 1956 per Hilversum I, 402 m (746 kc), VARA: Socialismaj I.

### ĴAŬDE:

- 07.45—07.50 Perpignan 202 m (1483 kc): K de R. Llech Walter.  
 09.30—09.40 Paris, 348 m (860 kc), 218 m (1380 kc): K. de Pierre Delaire.  
 12.55—13.00 Bern, 31,46 m (9535 kc), 48,66 m (6165 kc): P de prof. d-ro Edmond. Privat: „Esperanto-ideologio”.  
 18.30—19.00 Sao Paulo (Brazilo), 62,83 m (4775 kc): I kaj K.  
 18.35—18.40 Bern, la samaj ondlongo, frekvenco kaj P kiel 12.55.  
 23.30—24.00 Valencia (Hispanujo), 200 m (1500 kc): P kaj I.  
 23.45—24.00 Zagreb (Jugoslavujo), 264,7 m (1133 kc): P.



„..... Mi invitas Tutmondan Junular-Organizon kaj la Junan Vivon aliĝi al Tutmonda Instituto por Progreso kaj Universala Bonstato kiel „korporaciaj” anoj („corporate” members) de Commonwealth of Organizations Working for Progress an Universal Welfare.

Krom (ne ĉiuj) Esperantistoj neniu en la vasta mondo scias ion pri la „Interneta Ideo” de Esp-o kaj pri Homaranismo.

Se vi propagandos Homaranismon kaj Internan Ideon nur pere de Esperanto, vi ne rajdos fore.

Se vi vere volas diskonigi Homaranismon en la mondo, vi kaj aliaj homaranismanoj skribu kaj publikigu broŝureton pri la homaranismo en angla, franca, germana, itala, hispana kaj japana lingvoj.

Tion evidente ne povas fari unu sola persono. Estas do necese fondi Tutmondan Homaranisman Organizon (Asocion, Ligon). Vi povas nomi tiun organizon ankaŭ alie, sed ĝi devas ekfunkcii kaj preni sur sin la taskon publikigi homaranistajn verkojn de Zamenhof en diversaj lingvoj kaj helpi evoluigi la homaranisman teorion kaj klopodi praktike ĝin aplikigi .....

Prof. Dr. Ismael Wieslav Jezierski,  
Prusa 4/22

Krakow 2, Pollando.

al Sino E. v. Veenendaal  
Limmen (N.H.) Nederlando.

#### VENDREDE:

- 01.45—02.00 San José, 192 m (1562,5 kc): P.  
 18.55—19.10 Rome, 25,3 m (11810 kc), 30,9 m (9710 kc), 41,24 m (7270 kc):  
 P de prof. d-ro Vincenzo Musella.  
 20.15—20.30 Carlet (Hispanujo), 288 m (1040 kc): I.  
 22.30—22.45 Guatemala, 30,5 m (9836 kc), 47 m (6382 kc): I.

#### SABATE:

- 12.15—12.30 Rio de Janeiro, 214 m (1400 kc): K kaj I.  
 18.30—19.00 Rio de Janeiro, 16,8 m (17875 kc), 25,1 (11950 kc), 30,7 m (9770 kc), 375 m (800 kc): P.  
 19.45—20.00 Barcelona (Hispanujo), 360 m (832 kc): I kaj K.  
 23.15—23.25 Hilversum I, 402 m (746 kc) (en la 3-a kvaronjaro de 1956 per Hilversum II, 298 m (1004 kc), K.R.O.: Monata resumo de katolikaj I. (Nur la lastan sabaton de ĉiu monato; la aliajn sabatojn: Katolikaj I de 23.15—23.22).

#### Informoj kaj petoj:

**Radio Roma.** - Atentu pri la novaj ondlongoj kaj frekvencoj.

**Informojn pri Esperanto-radio-dissendoj** sendu ne nur la radiostacioj, sed ankaŭ la radio-geaŭskultantoj al: S. S. de Jong Dzn, Radio-Servo N.C.K.E., Waltaweg 3, TIERKWERD bij BOLSWARD (Frislando), Nederlando.